

TAMEN ★ PLU!

OFICIALA ORGANO DE ESPERANTO EN SUDAŬSTRALIO AŬGUSTO 2006 / JARKOLEKTO 25

Bob Felby - Tel (08) 8242 1460 - 6 Dorset St. Semaphore Park. S.A. 5019 - esperantobob@iprimus.com.au

Ankaŭ disponebla surrete ĉe la retejo de Esperanto en SudaŬstralia: <http://sa.esperanto.org.au>

Sandor kaj Ashley fiŝkaptis de sur ponto. Subite sin starigis Ashley dirante: Nun mi iros hejmen!”

“Ĉu jam? Demandis Sandor. – Kioma horo estas?”

“Tion mi ne scias!”

“Sed pli frue en la tago vi havis ja horloĝon!”

“Jes, sed plej verŝajne ĝi jam estas hejme, ĉar ĝi antaŭas duonan horon!”

Edukado

Se vi vere deziras lerni kiel senerare uzadi Esperanton, tiam trastudu pli ol nur unu fojon la verkon por la nova jarmilo: “Lingvaj Resondoj”.



Tiu ĉefverko de la fama Esperantologo kaj nemalhavebla instruisto, kiu ĉiam invitendas, kaj aktivas, en niaj Somerkursaroj kaj Kongresoj, Marcelo Leereveld, haveblas nun de la verkinto, 12 Heather Grove, Belgrave South, Viktorio 3160, kontraŭ nur \$22,00.

Se ne ekzistus lernejoj, la mensmalsanulejoj estus plenaj de patrinaj!

Gravaj Esperanto-eventoj

Merkredon la 2an de aŭgusto en Clarence Park ekde la 18a horo.

Merkredon la 16an de aŭgusto en Clarence Park ekde la 18a horo.

Merkredon la 20an de septembro en Clarence Park ekde la 18a horo.

Sabaton la 24an de septembro ni ĉiuj ekskursos al Haveno Viktoro.

Merkredon la 4an de oktobro okazos bonega kunveno en Clarence Park.

Dimanĉon la 15an de oktobro, je la 18a horo, okazos kantado, pian- kaj mandolinmuziko ĉe Indrani, 1/20 Fletcher Street, Woodville North, S.A. 5012, telefono 8268 4021.

Merkredon la 18an de oktobro okazos bonega kunveno en Clarence Park.

La 22a Somerkursaro kaj Kongreso de A.E.A. okazos inter la 7a kaj 19a de januaro en Hobarto, Tasmanio.

La Kongreso de Novzelanda Esperanto-Asocio okazos de la 3a ĝis la 5a de februaro 2007. La Ekskurso dum Waitangi-Tago okazos la 6an de februaro!

Diras dum dancado knabino al soldato: “Ĉu vi konas la diferencon inter dancado kaj marŝado?”

“Ne!”

“Ĝuste tion mi pensis. Ni prefere sidigu nin!”

Ashley Campbell

intervjuita de Katja



Ashley naskiĝis en 1950. Lia patrino, Gladys, estis supera flegistino en malsanulejoj en Burra kaj poste en Clare kaj ŝi bone ludis tenison. Lia patro, Henry, naskiĝis en Irlando kaj kiel 17-jara li estis sendita de orfejo, en kiu li vivis, al agrikultura orfejo en Aŭstralio. Li iĝis laborema kaj kiel terkultivisto li vivtenis sin dum sia tuta vivo. Li bone dancis, estis energia, inventema, ekstroverta. Gladys estis introverta, sed honesta, tre diligenta, afabla homo. Krom Ashley ili havis filon – Chris.

La familio loĝis en malgranda bieno apud Clare. Ili havis multajn bestojn kaj fruktarbojn. Ashley finance memstariĝis en 1968. En 1972 li komencis loĝi en komunumo kun aliaj homoj en Stepney, poste en Goodwood, Rosewater kaj West Hindmarsh. Tiun loĝadformon li praktikas jam 34 jarojn, de 1979 en Black Forest en “Seli Hoo”. Al la sama komunumo aldoniĝis en 1985 Sandor kaj poste Helen kaj la enloĝantoj de tiam ne posedas aŭton nek televidilon.

En la Adelajda Universitato Ashley iĝis inĝeniero kaj poste li laboris 4 jarojn ĉe la Publika Konstrua Departamento. Kaj nun? Krom ke li estas konsilisto pri konservado de energio kaj akvo, li diras:

“Nun mi fokusas miajn inĝenierajn kapablojn al sunenergio, konservado de energio kaj akvo. Mi konstruis multajn sunsekigilojn por fruktoj ka legomoj kaj panelan sunkuirilon. Ĝi esta malpeza, portebla, sed bezonas permanan rotaciigon ĉiun duan horon por sekvi la sunon.”

Ne profesie, sed Ashley provis ankaŭ la metion de masonisto, kiam li kaj Annie konstruis por si etan ĉambron el adoboj. Ashley kaj Annie kunloĝas en “Seli Hoo” ekde 1987.

Bicikladon Ashley lernis en 1956, 6-jara. Tiu “fera ĉevalo” iĝis lia nedisigebla akompananto kaj inter la plej memorigeblaj komunaj aventuroj apartenas la 1000 kilometroj, kiujn li biciklis en Tasmanio. Ĝi estis parto de kampanjo “Rajdas por la riveroj” (1981), celanta savi la riveron Franklin. Kiel naturprotektanto Ashley dum jaroj aktivis ankaŭ en la kontraŭnuklea movado kaj prenis parton en ekzemple la protesto ĉe uranminejo Honeymoon. Alia grava eco de Ashley estas lia vegetaranismo (de 1973). Lige kun ĝi li jam 25 jarojn aktivis en Manĝaĵkooperativo (Food-Coop) en sia loĝloko). Ne surprizas, ke siatempe Ashley kontraŭis ankaŭ la militon en Vjetnamujo kaj aktive manifestacias sian starpunkton (1968).

Lia rilato al la Esperanto-movado estas relative nova. Esperanto estas ekzerco por la cerbo kaj unu el la komunaĵoj de la loĝantoj de “Seli-Hoo” – li agnoskas. Nun Ashley fariĝis parto de la adelajda esperantistaro, regule prenas parton en la klubaj kunvenoj, kaj li ĉestis ankaŭ la vintrokursaron de “Esperanto en Sudaŭstralio”.

Nia neforgesebla ferio

Arturo kaj mi antaŭ nelonge feris du semajnojn en bela Tasmanio. Fluginte al Hobart ni luis ruĝan Corolla aŭton. Ni restis tri tagojn en Hobart, kie ni vizitis malnovajn geamikojn, trovis interesajn kafejojn kaj esploris la bazaron Salamankan.



Paskan dimanĉon, post eklezia diservo, ni veturis 300 kilometrojn ĝis Strahan ĉe la okcidenta marbordo. La pejzaĝo oriente de Hobart estas malsevera, bienoj, verdaj kampoj, vicoj da poploj kun belaj aŭtunaj folioj flavaj. Dum

la vojaĝo ni trapasis montojn kun majestaj, densaj arbaroj. Arboj tre maljunaj kaj belaj. La vojo serpentumas tiom, ke nia 300 kilometra vojaĝo daŭris pli ol 5 horojn.

Strahan estas malgranda alloga havenurbeto apud la haveno Macquarie, kiu estas 6oble pli granda ol la haveno de Sydney! Ni boatis ĝis la pordoj de Infero kaj ĝis Insulo Sarah, kie kondamnitaj punlaboristoj estis enkarcerigitaj ĝis 1833. Laŭ la reputacio ĝi pli kruelis ol Port Arthur apud Hobart.



Ni boatis laŭ la rivero Gordon, kie ni eliris ĉe Heritage Landing, kie ni promenis tra la arbaro de majestaj antikvaj arboj – “Huen pine” kreskas tie – unu el kiuj havis 2.500 jarojn! – sed ĝi falis antaŭ nur 3 jaroj.

Jam kreskas novaj plantoj el la falinta giganto. La arbaro estas tiom riĉa kaj densa. Tre pluvas tie. Sed tiun tagon ni ĝuis belan veteron.

La sekvan tagon pluvis, tamen, kiam ni vojaĝis por grimpi la monton en malnova vagonaro, tre lerte farita laŭ svisa modelo, estas pontoj trans rapide fluantaj riveroj, mallarĝa fervojo tra densega arbaro – belegaj vidaĵoj.

Post Strahan ni loĝis du tagojn en Cradle Mt. Fakte ni ne vidis la monton, ĉar nuboj kovris ĝin dum nia tuta vizito, sed tre okulfrappe estis matene malfermi la kurtenojn al blanka mondo ekstere, ĉar neĝis la tutan nokton. Belega vidaĵo! Ni promenis pli poste, komencis plui, tiam neĝpluvis, tiam vere neĝis, kaj ni tute malsekiĝis, sed estis feliĉaj pro la mirinda travivaĵo!

De Cradle Mt. ni du tagojn vizitis Launceston – bela malgranda urbo, sed tie la kompatinda Arturo bedaŭrinde falis kaj ricevis bluaĵon subokulan. Kiam li parolis al sia malnova amiko, Geoffrey pri la subokula bluaĵo, Geoffrey ŝerce (iomete krueleme) diris: “Mi ofte volis doni al vi bluaĵon sub la okulo, amiko”!! Arturo diris: “restas ankoraŭ la alia okulo”!

Pli poste ni veturis al Lilydale, kie loĝas la familio Gallagher – Johano, Lesley kaj Jasmine, kiuj estas esperantistoj el Adelajdo. Estis bonege revidi ilin en bieno “Cherry Tops”, kiu antaŭe estis kurhundejo. Ili laboregas tie, plantas avelarbojn, ĉerizarbojn, mirtelojn kaj legomojn, kaj konstruas novan domon el kotbrikoj antaŭpreparitaj de Johano. Ilia domo estas tre malnova, sed komforta kaj bone varmigata. Ni loĝis unu nokton en apuda movebla domo, kiun ili luigas kiel “tranoktejo kun matenmanĝo”. Jasmine havas ĉevalon “Mielo”, sur kiu ŝi kelkfoje rajdas. Ili havas ankaŭ maljunan katon.

Kune ni vespermanĝis bongustan vegetaran manĝaĵon. La konversacio estis brila kaj Jasmine eĉ komponis kanton per la komputilo por ni. Ni sentis nin tre honorigitaj!

De Lilydale ĝis Freycinet estas longa vojaĝo. La orienta marbordo estas pli facile atingebla ol la okcidenta. La duoninsulo Freycinet estas belega loko, - montoj, golfetoj kaj belaj marbordoj. Ni loĝis en arbara kabano, kie valabioj vizitis nin. Ni grimpis dum unu horo sufiĉe krutegan deklivon montetan por atingi la elrigardejon Wineglass Bay. Malfacila promeno, sed belega vidaĵo, kiu vere valoras la malfacilecon!

Do, ni reeniris Hobart, belan malnovan urbon. Tre plaĉis al ni la malnovaj konstruaĵoj en Hobart kaj en aliaj malgrandaj vilaĝoj. Ross, Callands, Richmond. La malnovaj ŝtonoj estas mielkoloraj, ili estas tre belaj.

Do ni estis tre kontentaj. Estis ege ĝuinda ferio. Tasmanio estas ja vidinda. Ni apenaŭ povas atendi ĝis la venonta somerkursaro en Hobart en januaro 2007!

Libby Mortimer

Necesis al apotekisto eliri. Li petis ke la komisia knabo prizorgu la vendejon iomete. Reveninte li demandis, ĉu iu venis aĉetonte.

“Jes,” diris la knabo, “venis iu, li deziris ion kontraŭ sia tusado. Mi donis al li botelon da ricino.”

“Ĉu ricino? Ĉu vi ne komprenas, ke tio tute ne taŭgas kontraŭ tusado?”

“Ho, ne estu tiom certa pri tio. Rigardu el la fenestro, tie li staras apogante sin kontraŭ tiu arbo. Kaj vidu, li tute ne kuraĝas tusi!”

Indrani vojaĝante

Venis eĉ tre bonvena letero de Indrani rakontante ke ŝi refoje survojas. Ŝi vojaĝas ĉi tiun fojon kvar monatojn, el kiuj du estos pasigitaj en Norda Hindujo, Uzbekujo kaj Birmo.



La unuajn du monatojn ŝi pasigis en Toronto solvante kelkajn privatajn problemojn. Samtempe ŝi vizitis siajn sennombrajn parencojn kaj amikojn. Ŝi trovis tempon por viziti ankaŭ malnovan amikon en Ohio. Poste ŝi pasigis kvin tagojn en Vaŝingtono, ĉefe por akiri sian vizon al Uzbekujo. Tie ŝi vizitis la usonan parlamentojn, la memorigilon de Lincoln, la Blankan Doman, plurajn artgaleriojn kaj muzeojn, ekz. la Smitsonian ktp. Ĉio tre impona kaj rigardinda!

Estis tre varmege dum ŝia tiea restado, sed unu semajnon poste ŝi sukcesis eviti la inundojn. Eĉ en Toronto fulmotondris kaj pluvegis. Espereble tio ne okazos en Norda Hindujo. Ŝi ne tre ĝojas pro la antaŭnelongaj atakoj al vagonaroj.

Vizitis svedo Kopenhagon por ĝui la danan bieron. Ĉiun glason da biero oni metis antaŭ li sur korkan subglason. La biero bongustis kaj la svedo trinkis iomete tro. Post ankoraŭ unu mendo li diris:

“Fraŭlino, plaĉus al mi ankoraŭ unu biero, sed mi petas, ne pli da biskvitoj...!”

Venos biciklanto

Al Aŭstralio venos – iam en la estonteco – vizitanto biciklanta el Svisujo. Antaŭ iom da tempo li forbiciklis el sia hejmlando kaj nun li estas en Kroatujo. Ni antaŭĝojos renkonti lin!

“Kio en la mondo estas tio, ĉu vi aĉetis lulseĝon?”

“Jes, mia kuracisto diris, ke mi bezonas fari gimnastikon!”

El letero al papo Benedikto la 16a

“La neŭtrala planlingvo Esperanto kun sia riĉa kulturo de interkompreniĝo kaj paco vere povus transpreni la rolon de la latina lingvo en la eklezio. Tio certe estus modelo por ĉiuj internaciaj rilatoj, kaj neniam plu unu popolo subpremigus alian per lingva hegemonio. Tiel la katolika eklezio farus servon nesupertakseblan por la homaro kaj estus beno por la tuta mondo.

Albrecht Kronenberger

Kiam la vagonarkonduktoro duan fojon trairis ĉiujn vagonojn por kontroli biletojn, kvankam la vagonaro ankoraŭ ne estis haltinta, unu el la pasaĝeroj perdis la paciencon kaj ekkriis: “Ĉu vi eble kredas, ke ni multobligis nin dum tiom da mallonga tempo?”

“Se tiel estus”, respondis la kondukto, “tio ne koncernus min, ĉar infanoj malpli ol 7 jaraj veturas senpage!”

Speciala poŝtstampo por la 91a UK

Uzeblas en Florenco poŝtstampo. Al restos hejme, la UK bonestu poŝtkartojn, vidu tiun



dum la 91a UK speciala tiuj multaj, kiuj la ĉeestantoj en sendi por ke ankaŭ ni belegaĵon.

“Vi mensogas”, diris la policano.

“Ne, mi ĵuras, ke mi estis for la lastajn du tagojn de februaro!”

“Galimatio! La du lastaj tagoj de februaro tute ne ekzistas!”

La Esperanto-urbo

Okazis unika evento por la Esperanto-movado: laŭ decido de la urba konsilantaro de Herzberg – ĉiuj deputitoj de la 4 partioj kun 3 sidetenoj – voĉdonis la 11an de julio kun la

rezulto ke la nova oficiala nomo de la urbo estu: Herzberg am Harz, die Esperanto-Stadt/la Esperanto-urbo.

En ĉiu kampo la urbo, laŭ sia kapablo, fiere subtenas la puŝadon antaŭen kaj uzadon de la internacia lingvo Esperanto por neŭtrala internacia interkompreniĝo. La Esperanto-urbo planas uzadi la lingvon por montri al la mondo siajn homajn, turistikajn ktp. valorojn.

Jam nun vojmontriloj montras la vojon al la urbocentro en Esperanto. La oficiala leterpapero surhavas la nomon: Herzberg, la Esperanto-urbo.

Esperanto uzatas por la ĝemelurbaj kontaktoj inter Herzberg kaj Gora en Polujo. Parttempa dungito de la urbo prizorgas la Esperantrilatajn aferojn kunorganizante programojn, disdonate Esperanto-afiŝojn, alvokante al ĉio Esperanta, ktp. ktp. ktp.

En la malnova urbodomo funkcias jam Esperanto-arĥivejo. La Esperanto-urbo provizas, senpage aŭ ege favorpreze, ejojn por Esperanto-kursoj, konferencejoj, kunsidoj, renkontiĝoj, koncertoj ktp. ktp.

Viajn eventualajn gratulleterojn bonestu sendi al la urbestro, Gerhard Walter: buergermeister@herzberg.de kaj ni petas vin sendi samtempan kopion al Esperanto-zentrum@web.de. Dankon!

Buĉisto fariĝis predikanto. Predikante antaŭ la kunfrataro li kriegis:

“Antaŭe mi buĉis porkojn kaj bovinojn, sed nun mi estas buĉinta la diablon mem!”

Tiam aŭdiĝis voĉo el inter la kunfrataro:

“Ne surprize ke la kolbasoj gustis kvazaŭ infero pasintan semajnon!”